Rudolf Liebisch,

Glubŝico

tradukita de Manfred Retzlaff

Ho Glubŝic', ne ĉesos ami
mi vin kaj per kant' ornami
volas vin.
Kiel hejma lando mia
ja sorĉigis milda via
belo min.

Kvazaŭ sonĝe kuŝigite
ĉe l' montara rand' metite
kŭsis vi,
kiam vin unuafoje
en vespera lum' survoje
vidis mi.

Viaj domoj brilis ore,
la ĝardenoj luksis flore
kun odor', -
kaj el inter l'urbaj muroj
la du sveltaj preĝej-turoj
vidis sor.

Mi afable akceptiĝis
kaj finfine resaniĝis
kor' de mi.
Kaj la paco serĉadita,
fine estis donacita
tiu ĉi.

...

Mi en viaj stratoj trovis
amikecon, kiu movis
min en kor'.
Povis vidi mi sur viaj
stratoj inojn kun iliaj
bel-dekor'.

Sonĝas en trankvila horo
mi, ke hejmas mia koro
je la fin',
feliĉiĝis tie ĉi
kaj pro tio benas mi
urbon vin.

Traduko de la Germana poemo "Leobschütz" de Rudolf Liebisch *(∗1861-12-25 – †1939-06-09) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-988-1995 (2014-05-07 10:12:41)